# ESPERANTO notícias
## INFORMATIVO DA ASSOCIAÇÃO PAULISTA DE ESPERANTO

Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

http://easp.org.br – Redação: Paulo S.Viana
**1º de julho 2026**




### VIBRANTE CONGRESSO BRASILEIRO DE ESPERANTO EM JOÃO PESSOA

De 4 a 7 de junho de 2026, aconteceu em João Pessoa / PB o 60º Congresso Brasileiro de Esperanto, com o tema "Esperanto e as línguas indígenas, resistência e luta contra a hegemonia linguística". Organizado pela Liga Brasileira de Esperanto, com a participação de uma centena de falantes da Língua Internacional de várias regiões do Brasil, foram discutidos vários aspectos referentes à democracia linguística no mundo moderno. No programa, apresentaram-se palestras e discussões sobre a cultura do Esperanto e o seu ensino em nosso país. Membros da comunidade indígena daquela região do Brasil participaram ativamente do evento e contribuíram significativamente para o seu sucesso.
O congresso teve, em paralelo, o 27º Encontro de Esperanto do Nordeste Brasileiro e o 13º Congresso da Juventude Esperantista Brasileira. Fernando Maia, presidente de Associação Universal de Esperanto, esteve presente e muito contribuiu para a programação do congresso.

### ENTUZIASMA BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO EN JOÃO PESSOA

Inter la 4-a kaj 7-a de junio 2026, okazis en la urbo João Pessoa, en la brazila ŝtato Paraíba, la 60-a Brazila Kongreso de Esperanto, kun la temo "Esperanto kaj indiĝenaj lingvoj, rezistado kaj batalado kontraŭ lingva hegemonio". Organizita de Brazila Esperanto-Ligo, kun partopreno de cento da parolantoj de la Internacia Lingvo el pluraj regionoj de Brazilo, en ĝi oni diskutis pri diversaj aspektoj de lingva demokratio en la moderna mondo. En la programo, prezentiĝis prelegoj kaj diskutoj pri la kulturo de Esperanto kaj ĝia instruado en nia lando. Membroj de la indiĝena komunumo de tiu brazila regiono partoprenis la eventon kaj grave kontribuis al ĝia sukceso.
La kongreso kune proponis ankaŭ la 27-an Renkontiĝon de Esperanto en la Nordorienta Regiono kaj la 13-an Kongreson de Brazila Esperantista Junulara Organizo. Fernando Maia, prezidanto de Universala Esperanto-Asocio, ĉeestis kaj multe kontribuis al la programo de la kongreso.

**




**CÂMARA APROVA LEI SOBRE**
**"O DIA DO ESPERANTO", EM PETRÓPOLIS**

Segundo informação do ativista Márcio Baltar, que de longa data divulga e usa a Língua Internacional Esperanto na cidade de Petrópolis / RJ, a Câmara Municipal aprovou projeto de lei que institui o dia 15 de dezembro como "Dia do Esperanto" no município. O projeto foi encaminhado pelo vereador Dr. Aloísio Barbosa, por sugestão de Márcio Baltar. Curiosamente, segundo relato do próprio vereador, foi decisiva a intervenção de sua mãe, que o aconselhou a apoiar a iniciativa, pois ela mesma estudara Esperanto na juventude e recomenda a sua ideologia de paz e fraternidade entre todos os povos. No dia 15 de dezembro, Esperantistas de todo o mundo rendem homenagem ao Dr. Lázaro Luiz Zamenhof, o iniciador do Esperanto, na data de seu nascimento, na Polônia, em 1859.

**URBA KONSILANTARO APROBIS LEĜON PRI**
**"TAGO DE ESPERANTO", EN PETROPOLO**

Laŭ informo de la aktivulo Márcio Baltar, kiu de longa tempo diskonigas kaj uzas la Internacian Lingvon Esperanto en la urbo Petropolo, en la brazila ŝtato Rio-de-ĵanejro, la Konsilantaro aprobis leĝo-projekton, kiu oficialigas la 15-an de decembro kiel "Tagon de Esperanto", en tiu municipo. Tiun projekton proponis konsilanto D-ro Aloísio Barbosa, laŭ indiko de Márcio Baltar. Kurioze, lau raporto de la Konsilanto mem, estis decida interveno de lia patrino, kiu konsilis lin apogi la iniciaton, ĉar ŝi mem studis Esperanton en sia junaĝo, kaj rekomendas ĝian ideologion de paco kaj frateco inter ĉiuj popoloj. En la 15-a de decembro, Esperantistoj en la tuta mondo omaĝas D-ron Lazaro Ludoviko Zamenhof, la iniciatinton de Esperanto, en la dato de lia naskiĝo, en Pollando, en 1859.